4e Jaar n° 6 Maandblad. Mei 1945.

# P A C O kaj J U S T E C O

Organ der E°-beweging:
"Paco kaj Justeco" BRUGGE.

Voorzitter : Drs. F. ROOSE -J. & M. Sabbestraat,12 - BRUGGE
Advertentie; Secretariaat : ROOSE - DE KERSGIETER,
J. & M. Sabbestraat,12,- BRUGGE
Propaganda : Fons NORRO, Coupure, 33,- BRUGGE
Penningmeester: Roger MARTENS, - Blokstraat,6 ,-BRUGGE

Lidgeld : Eere-abonnent: 75 Fr. en meer; lid-abonnent : 25 Fr. en meer;
gewoon lid : 5 Fr. en meer; steunend lid : 5 Fr. en meer,

te storten op Postrekening nr 479170 van DE KERSGIETER H.,
J. & M. Sabbestraat,12, - BRUGGE.

()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()

## Skizo de la antikva greka Filozofio (6a daŭrigo).

### La Sofistoj.

Estas en tia medio ke ekstaras la sofistoj. Ili estas profesiaj instruistoj
de la arto "bone paroladi por konvinki". Ne plu gravas serĉi kaj trovi en
kio konsistas la bono,la vero k.t.p.La bono estas tio kio estas utila.
Kaj la vero estas tio kion la amaso kredas. Tial estas ŝajnaj scienculoj.
Ili paroladas pri ĉio sed ili ne konas tion pri kio ili paroladas.Ili
klopodas por brili kaj por havi influon. Hippeas sciigas ke en ĉiu cirkon-
stanco pri kio ajn li diros ion novan.
Sekvas tie-ĉi kelkaj ekzemploj de sofista rezonado.

GORGIAS

1. Ekzistas nenio. Se ekzistus io, ĝi estus eterna aŭ ĝi estus ekestinta.
Se ĝi estus ekestinta, ĝi estus ekestinta el io aŭ el nenio. El nenio,ĝi
ne povas ekesti, ĉar neniu io povas ekesti el nenio.Do ĝi ekestis el io.
Do ĝi jam ekzistis, ĝi ne ekestis. Do ĝi estas eterna. Kio estas eterne ha-
vas nek komenciĝon nek finiĝon. Kio havas nek komenciĝon nek finiĝon estas
nenio. Kio estas eterne estas nenio.
2. Ankaŭ se ekzistus io, ĝi ne estus komprenebla ĉar ĝi ne estas pensite-
bla. Efektive la realeco kaj la pensataj aĵoj ne estas identaj.Ĉar ekzistas
aĵoj kiujn oni neniam pensis kaj la penso kreas aĵojn kiuj ne ekzistas en
la realeco.
3. Sed ankaŭ se oni povus kompreni ĝin, oni ne povus ĝin sciigi al aliaj.
Tio kion oni ja sciigas al aliaj estas nur vortoj. Sed vortoj ne estas la
esenco de la "esto".

ZENO.

Ni jam vidis ke Zeno kapablis pruvi ke la rapidega Aĥilo neniam venos al
egala distanco de la testudo se tiu lasta havas ian ajn antaŭ-distancon
ĉe la komenco de la vetkurado. Nun vidu lian pravon ke la multoble ne
estas ebla. Ŝajno estas aŭ eterne granda aŭ eterne malgranda. Ne io inter
la du. Ne iu multoble. Ĉar se punkto havas ian ajn grandecon la salono
estas eterne granda ĉar ĝi konsistas el senfina nombro de punktoj.
Se la punkto ne havas ian grandecon tiam la salono estas eterne malgranda.
Sammaniere la movo ne estas ebla. Vetkuristo en stadio devas trakuri sur
eĉ la plej malgranda distanco tamen ne finiĝantan nombron de distancoj.
Kaj ĉar tio ne finiĝas, li ne progresas, do ne moviĝas. Se oni arkpafas
sagon ankaŭ ĝi ne moviĝas ĉar neniu de la partoj de la sago ŝanĝas sian
lokon rilate al la aliaj partoj de la sago.Se neniu parto ŝanĝas lokon tiam
ankaŭ la tuto ne ŝanĝas lokon, do ne moviĝas. Cetere la sago ankaŭ devas
komenci por la traflugo de senfina nombro de distancetoj en eĉ la plej mal-
longa distanco. Do..

EUBOULIDES.

Li atakas la identecoprincipon kiu diras ke io ne kapablas esti samtempe
io kaj nenio. Same oni povas diri ke io ne povas esti io kaj samtempe la
malo de tiu io.
Eubulides asertas ke vero kaj malvero estas la samaj.

. . . .

La pruvo: Foje venis in enloĝanto de la insulo Kreto kiu diris:"ĉiuj Kreta-
noj estas mensogulo j". Nu .Aŭ li diris la veron kaj tiam li mensogis, ĉar
se li diris la veron tiam li mem, ankaŭ Kretano, ne estas mensogulo kvan-
kam ĉiuj Kretanoj -laŭ li- estas mensogulo j. Kaj se li mensogis tiam li di-
ris la veron nome ke ĉiuj Kretanoj estas mensogulo j,do ankaŭ li mem. Kaj
en tiu-ĉi kazo vi vidas ke vero kaj mensogo estas identaj. Jen vi havas
tri sofistojn kun ilia rezonadmaniero.

SOKRATO.

Kontraŭ tiuj falsaj profeŝoj kaj ŝajnfilozofoj batalis tre akre unu de la
plej geniaj pensuloj kaj idealistaj homoj de la homaro,SOKRATO kiu estas
unu de la plej famaj homoj en la Mondhistorio. Li neniam ion skribis sed
liaj lernantoj,precipe la genia PLATO, eternigis la memoron pri li. Nenom-
breblaj anekdotoj estas disvastigitaj. Kiu ne ankoraŭ aŭdis la nomon de
lia edzino Ksantippe ? La plej malbonkaraktera virino de la Mondhistorio.
Al kiu li edziĝis por fine povi interpaciĝi kun ŝi. Ĉar tiam li kredis ke
li povus interpaciĝi kun la tuta Mondo. Li loĝis en tre malgranda domo,
kvankam li povis havi luksan domegon. Al amikoj kiuj demandis kial li elek-
tis tian malgrandan loĝejon,li respondis:"Dio donu ke mi povus plenigi ĝin
je veraj amikoj". Kaj kiam,false akuzita kaj kondamnita,li estis eltrinkon-
ta la pokalon kun veneno, al la amikoj kiuj ploris pro lia tuj venonta mor-
to, li diris : ĉu vi do ne scias ke depost mia naskiĝo,la naturo dekretis
la mortpunon al mi? " Tiel en la lastaj momentoj de lia vivo li ankoraŭ do-
nis lecionojn. Ma Tiu homo predikis ke ekzistas absolutaj vero,bono kaj
justo sendependaj de la kredo aŭ de la konvinkoj de la homoj. La vojo por
atingi ilin certe ne estas facila nek mallonga. Sed kiu klopodas malko-
vros tiun veron. Li volas helpi. Oni devas komenci je si mem. Konu unu vin
mem. Kaj en la komenco li rajtis diri ke li sciis ke li nenion sciis. Efek-
tive, se oni nur volas akcepti tion kio estas absolute certa.
Pri preskaŭ ĉio kion oni scias oni vidas ke preskaŭ ĉio estas necerta se
oni en plena objektiveco serĉas ĉu ne estas sufiĉaj motivoj por dubi:Tial
Sokrato promenadas kaj kmopodas kiel eble plej diskuti kun personoj. Li
demandas kion ili certe scias. Kaj kiam ili diras sian konon tiam li faras
demandojn por vidi ĉu absolute ne estas motivoj pmm dubi pri tiu komo.
Rapide tiuj personoj ne plu estas certaj pri tio kion ili diras kaj tiam
Sokrato helpas fiksi tion kion ili ambaŭ povas akcepti kiel certan.Ĉiam la
amaso de tiel nomata ko no malpliiĝas al tre malgranda kono,sed,certa kono
Tiel Sokrato instruas, la memkontrolon kaj la ĝustajn kritikojn emon kaj
kapablecon. Vi tuj vidas,kara leganto, ke la nuna tem bezonas denove iun
Sokraton por instrui la homaron. Post multaj jaroj de lia laborado,lia spe-
to konvinkis lin pri tio ke la virto konsistas en la scio. Se iuj ne virte
agas, fiagas,la kaŭzo estas ke ili ne scias ke ili malbone agas. Efektive,
malbona ago ĉiam malutilas al tiu kiu ĝin faras. Se do li tamen faras ĝin,
estas ĉar li ne vidas, ne konas la malbonan efikon kiun ĝi havos por li mem
Do instruu lin pri tio. Kaj tiam vi povos esti certa ke li ne plu faros,ĉar
neniu volas agadi por propra malutilo.

La Cinikuloj.

Malgraŭ la profeta rolo de Sokrato kaj lia instruo la homaro ne pli bone
fartis kaj ne reiris al la vojo de bono. Oni vidis ke ne nur la ĝusta scio
estas necesa sed ankaŭ la ĝusta volo. Laŭ tiu maniero la cinikuloj klopodis
por redoni la feliĉon al la homaro. Ekzercado de la volo. Estu sin mem.
Subpremi la instinktojn. Ĉiuj subjektivaj sentoj kaj emoj estas senvaloraj.
Klopodi por konsideri ĉiujn objektojn kiel fremdajn al propra estaĵo kaj
kiel senvalorajn. La plej konata reprezentanto de tiu sistemo estas Diogenes
kiu dum tagmezo trakuris la stratojn kun brulanta lanterno por trovi "viron"
(viro en la severa senco de li donita al la koncepto), kiu loĝis ne en domo
sed en barelo, kaj al kiu la granda reĝo Aleksandro kiu preterpasis,povis
fari neniun alian plezuron ol "iri el lia suno",ĉar, staranta antaŭ Dioge-
nes kiu restis sidi, li malhelpis ke la sunradioj venis al la filozofia he-
roo. Diogenes resumis en tiu-ĉi sentenco:"kontraŭ la fatalo,la kuraĝo,kon-
traŭ la konvencio, la naturo; kontraŭ la pasio,la racio". Fakte la anoj de
tiu grupo batalis kontraŭ ĉia tradicio,kontraŭ ĉia kulturo,kontraŭ la fami-
lio k.t.p.

La Stoikuloj.

Kaj la homaro ne fartis pli bone. Nek la ĝusta scio nek la ĝusta volo savis
la homaron. Ni diras: ĉar la homaro ne serĉas la ĝustan veron kaj ne volas
bridi siajn pasiojn. Sed la stoikuloj donas alian rimedon kiu ankaŭ ne suk-
cesas : la ĝusta tolero. Lernu toleri! Ĉio kio venas super vi,ĉu feliĉo ĉu
malfeliĉo, akceptu ĝin, ne rifuzu,sed rezignu ĝojoplene. Pripensu ke ĉio es-
tas unu.Nia korpo estas unu kun la universo. Ni estas ne distingitaj de la
vivo de ciuj aŭ de ĉio. Ĉio estas ero de la universo kaj ĉiu vivo estas par-
to de la tutvivo. Nur nia volo estas de ni. Do se ni malĝojas,tio dependas
. . . .

de ni. Kvankam ili scias ke oni ne povas atingi tian staton en kelkaj minutoj ili tamen nur konas perfektulojn kaj malsaĝulojn.(laŭ la argumento: iu kiu estas el Ateno nur je kvin metroj tamen estas tiom el tiu urbo kiom iu kiu forestas je distanco de kvin kilometroj). Tial ili ne predikas moralan leĝaron, ĉar la perfektulo ne bezonas ĝin kaj al la malsaĝulo ĝi estas neutila.Ankaŭ,ili ne estis logikaj je propraj principoj kaj multe en la antikveco oni interdiskutis. Ekzemple: perdo de propraĵ riĉaĵoj ne estas grava. Do por la aliaj perdo de iliaj riĉaĵoj ankaŭ ne estas grava. Do oni povas ruinigi alian ? Tamen la plimulto de la stoikuloj ne jesis tion.

(daŭrigotu)

verkis: Drs F. ROOSE.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Vlaamsche Esperantisten,uw blad is

FLANDRA ESPERANTISTO

uitgebreid,actueel,interessant,veelzijdig,goed ingelicht

Uitgegeven door Flandra Esperanto-Instituto V.z.W.
Instelling voor Esperanto-Onderwijs & Propaganda

Redactie & Administratie:P. van Humbeeckstr.3,Brussel-West

Losse nummers: 5 Fr.Abonnement tot einde 1945(8nrs) : 36 Fr.
Postrekening 3268 ,51 van F.E.I., Brussel.

\+ + + +

+++++++++++ In Memoriam : Kio Tedat . . . .(+ 1.11.44) +++++++++

\+ + + +

Estis je la komenco de Oktobro 1944, kiam mi ricevis la novaĵon,ke mia amiko Kio Tedat estis ege malsana,kaj ke li min vokis. Mi ektimiĝis kiam mi vidis lin,kaj mi klopodis iomete kuraĝigi...sed li ne permesis tion: " Baldaŭ estos mi morta, kaj tion mi ŝatas..."Tiam li demandis nur ekkonigi lian morton,kiam skribis alia poeto por la gruprevuo, Kaj nun,en la numero de Marto aperis poemo de X Y Z,do, nun estas tempo por plenigi mian devon.

Kvankam multaj personoj en la grupo pensas ke Kio Tedat kaj mi nur estas unu persono,tamen ne estas tiel..kaj kvankam la prezidanto diris al angla E isto kiu estis invitata en nia grupo, ke ankoraŭ ekzistis nekonata membro li eĉ ne estis grupano; li ĉiam estis sola...mem mi nur iomete tuŝis la eksteran flankon de lia vivo...

En aŭgusto 1943 mi foje donis la revuon al li, kaj demandis,ĉu li ne volis ensendi ion..eble sub pseŭdonim-nomo...kaj mi proponis por tio:"Kio Tedat". Tio estas literŝanĝo de "Katidoto" tiam multfoje uzata vorto de la grupanoj. Tramani re aperis la unua poemo de li en la numero de Oktobro 19.. la lasta aperis en la numero de Septembro 1944; kaj inter tiuj du poemoj,en tiu kompleta jaro de verko, estas prenata laŭ mia ideo, la tuta evoluo de Kio Tedat.

Kio Tedat ŝatis kritikon, kaj pro tio li estis al la revuo tre dankema. Rimarkinde estas ankaŭ ke diferencaj kritikistoj tiom malegale kritikis liajn poemojn. Por pruvi : pri la poemo"Verlangen"(Nov.'43) la redakcio diris ke mankis ritmo; la instruisto de literaturo en la "Retorika" de la Xav. Frat..oj,diris ke ĝi estis:"een echt meeuwennest op traag-witten vleugelslag; Pri "Kinderdroom"(Febr.'44) diris la redakcio ke estis multe pli regule konstruata, kaj ke estis du multe pli bela ol la aliaj.Laŭ la penso de la jam nomata instruisto,ĝi ne valoris ion..
Pri "Dio eterne atendas"(Marto '44) donis la redakcio tre favoran kritikon kaj almetis citaĵon de Rainer Maria Rilke.."Geduld: ist Alles"..Ankaŭ ĝi diris ke, kvankam estis vere bela, ĝi tamen estus pli bela kun pli regula konstruo kaj ritmo; la alia diris:"een zeer goed gedicht,idee en ritme dekken elkaar..."Laŭ mia o pinio, estis en la kritiko de la redakcio,la flanko de la verk-teĥniko preskaŭ plej ĉefa, kaj la literatur-instruisto nur sentis estetan ĝuon..aŭ ne, sen rigardi la teĥnikon...

Kio Tedat ankaŭ foje demandis la opinion de André Demets, la fama flandra kritikisto..Tiu diris ke la poemoj montris talenton,sed ke tiu devis ankoraŭ maturiĝi, profundiĝi..

. . . . .

Laù l/a ideo de Kio Tedat, estas nur tri poemoj de tiuj kiuj aperis en la revuo, kiuj iomete valoras, V.e. : Dio eterne atendas, La Vivo (Junio'44) kaj "Nacht "(Septembro'44). La aliaj ne valoras ion laù li.

Kun kelkaj de la grupo, mi bedaùras ke Kio Tedat mortis, sed mi tamen pensas ke tio estis la plej bona, kion li povis fari.

Li mortis la lan Novembron 1944.

A. CLAEYS.

\+ + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + +
\+ + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + +

? ? ?

TRIA ENIGMO

? ?

8.14 - 3.2.12.9.E5.9.5 - 6.7 - 7.6 - 16.9.16.9.7.9.1 -
\- 7.14.15.18.13.9.15 - 16.4.3.6.15 - 16.9.3 - 11.2 -
\-10.14.4.1 - 13.9.11.6.12.4 - 7.6 - 15.9.8.9.15 -
12.2 - 7.6 - 2.17.2.3.15.4.7.9 - 11.6.I - 5.2.3.13.6.12.4
\- 6.7 - 7.14 - 4.15.4.6.15.14.8.2

Anstataù la nombroj metu literojn. La sama nombro signifas ĉiam la saman literon. La rezulto donos interesan frazon de la profeto Cefanja en la Malnova Testamento.

Ŝlosil-vortoj :

1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 2, 8, 9 = sankta urbo
10,9,11, 9, 7, 6,12, 9 = dolĉa manĝaĵo.
13,14,15,9 = forta trinkaĵo
10, 6,16, 2, 7, 9 = ĝi estas sur la kapo.
17, 6,18, 9 = parto de la semajno.

\---------------------------------

ANGULO DE LA REDAKCIO.

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

Ni metis demandon en la lasta numero por ke la legantoj bonvolu sciigi sian xxxxxx opinion pri la revuo. Nur unu persono respondis! Ni kredis tamen ke la momento (vidu la enhavon de tiu numero) estis oportuna por fari tiun demandon. Kaj efektive oni multe babilis pri ĝi sed oni preferis buŝe esprimi sian penson kaj prefere kiam la supozita aùtoro de la kritikota artikolo ne apudestis anstataù al konigi sian ideon per letero al la redakcio. Preskaù ĉiuj malŝatas la artikolojn de Randi.
Laù dolĉa maniero ni klopodis por atentigi lin pri tio. Li respondis al la redakcio kaj petis por enmeto en la revuo. Ĉar li konas bone la Esperanto lingvon, ni cedis al tiu demando laù kondiĉo ke li redaktas ĝin en tiu lingvo. Jen sekvas, korektita, lia teksto :

" Paco kaj Justeco" ne plu ŝatas miajn artikolojn kiuj estas "tro perso-
" naĝ ka kiuj tro malbonfamigas aù kiuj tro elmontras la kritikeblajn
" ecojn de kelkaj personjon". Estas en tio io kiu mirigas min kaj io kiu
" ne mirigas min. Mi miras ke estas precize miajn artikolojn kiujn mi ne
" ŝatas. Ĉar ne nur mi skribis personajn artikolojn sed ankaù aliaj. Mi
" foje relegis ĉiujn tiujn artikolojn kaj ŝajnas al mi ke en miaj artiko-
" loj mi precipe elmontris la belajn ecojn de la koncernaj personoj dum ke
" la aliaj, same kiel mi, estis mokridaj kaj eĉ pli ofendaj.

Mi ankoraù bone memoras la tempon ke tiaj artikoloj povis aperi. Ili kaùzis nur gajecon. Nun ili kaùzas koleron. Ili ne plu povas aperi. Kaj tio ne mirigas min. Tio ne mirigas min ĉar mi konstatis ke la spirito de la grupo multe malboniĝis. En tio oni vidas ke nia tempo ankaù influas la karakteron de niaj gemembroj. Al tiuj kiuj sentas sin ofenditaj mi povus doni jenan konsilon kiun mi foje legis: se tio kion oni diras pri vi estas vera, plibonigu vin; se ĝi estas malvera, ridu pri ĝi. Sed mi scias ke oni preferas gardi siajn malvirtojn kaj lasi ilin labori ...en sekreto. Kaj per tio ili fakte mem konfesas ke estas malvirtoj. . . .

"Estu tamen kvietaj, legantoj, mi adiaùas. Vi vidas ke mi ne metas "karaj legantoj" ĉar fakte vi ne plu estas karaj al mi. Nur unu lasta rimarko! 'Unu de la legantoj diris ke mia foriro estas bedaùrinde ĉar la personaj "artikoloj estas la solaj kiujn oni legas (!)"

R A N D I.

Jen la lasta kunlaboro de nia korespondanto. Ne estas la tasko de la Redakcio en tiu-ĉi kazo por aprobi aù malaprobi. Sed nun la redakcio havas alian demandon : Ni urĝe bezonas kunlaboron! Preskaù neniu ankoraù ensendas artikolojn. Tio kondukas nin al katastrofo.

La Redakcio.

---

Paĝo de la Esperanto-movado

Aperis la unua numero de "Flandra Esperantisto". Ĝi promesas multe. Ĝi estas belaspekta. Diversaj librejoj vendos apartajn numerojn. En BRUGGE estas la librejo "Unicum" W.F.COOPMAN, Lange Rei. Tiuj kiuj volas solvi la enigmon devas atenti ke la maldekstra flanko de ĝi devas esti turnata supren. En la katalogo de la libroj ni vidas ke tre multaj altvaloraj libroj ne plu estas haveblaj. En tiu numero ni legas ankaù ke Belgujo estas la sola lando kie Esperanto estas malpermesata en korespondado. Ĝi ne estas la sola tereno sur kiu Belgujo montras malbonan ekzemplon. Precipe interesa estas la novaĵo ke Stalin parolas nian lingvon kaj ke li montris tion al Churchill. Tiu fakto estos pli taùga argumento ol dek bone dokumentitaj artikoloj. Tia estas la homo! Ĉu vi havas intereson je malproksim orienta politiko? Nu, aĉetu tian la 27 lastajn oficialajn paroladojn de Chiang-Kai-Tchek en Esperanto. Sed kie aĉeti tion? Ankoraù multaj aliaj interesaĵoj estas en tiu unua numero.

Aperis ankaù la dua numero de "Flandra Katoliko". Ni legas tie multajn belajn vortojn ekz.: het vraagt tijd en inspanning, onthechting en offers, om een goed Esperantist te worden en te blijven. Het is dikwijls zeer moeilijk bijna heldhaftig ascetisch, het Esperantoideaal te blijven nastreven. Vooral in de jaren die achter ons liggen moeten velen bezweken zijn voor de bekoring om er het bijltje bij neer te leggen.."
Ni scias ĉion pri tio. Ni tre bone spertis ĝin. Kaj ni scias ke preskaù ciuj efektive demetis la hakilon. Nun, eble ili repronos la hakilon. La danĝero estas ja for." Maar wij verwachten een andere houding van de getrouwen die met ons gereed staan om mee te bouwen aan een nieuwe maatschappij".
Ni tre bedaùras ke ni ne povis atendi tian sintenon dum la germana okupado. Estas tial ke mi tre dubas pri ilia idealismo kaj oferemo. Nur la estraro de Flandra Ligo subtenis nin. Kaj entute unu membro de F.U.K.E.
Ni scias ke multaj estis en tiaj cirkonstancoj ke ili vere ne kapablis helpi. Sed ankoraù pli multaj estis jes en la ebleco sed tamen ne faris.
Nun la danĝero estas for kaj iliaj idealismo kaj oferemo superas ĉion.. se oni estas tiel naiva kredi ilin. Kompreneble ankaù ne mankas en tiu numero la necesa atako al neùtrala Esperanto movado. Kompreneble sen ke ili fo... kaj argumente priparolas tion kion ni skribis pri tio en nia revuo. Tamen, karaj legantoj, estu tute certaj pri la bona kvalito de iliaj kunlaboroj, ĉar ni ekscias ankaù el la raporto de la estrarkunveno de F.U.K.E. ke ĉiuj kunlaborantoj devos prezenti ateston pri "civikaj fideleco kaj fidindeco".
Ni ricevas tre regule "American Esperantist" kies unu de la redaktoroj estas la famkonata Dro Wilhelm SOLZBACHER kiu faris foje paroladon en nia grupo. Li rakontas en diversaj numeroj laù kia maniero li sukcesis resti el la manoj de la Gestapo kaj fine iri al Ameriko. Estas komprenoble ke la revuo precipe okupiĝas pri "Basic English" kiu estis forte propagandata en la Anglo-Saksaj landoj. Interesa kunlaboranto estas la ĉina pastro Dro J.B KAO. Tre interesa artikolo estas "dumbarton Oaks and the tower of Babel" de Dr Wilhelm SOLZBACHER. Sed estas tiel multaj interesaĵoj. Ankaù la redaktaĵoj de Prof. Dr MORIO Pei kaj de la konata Hispana Respublika generalo MANGADA. Unu de la numeroj sciigas al ni ke la tre bone konata Katolika Esperantisto Dro METZGER estis murdata de la Germanoj.
La same fama Jugoslava Esperantisto Dro Ivo Lapenna rakontas pri la teruraj cirkonstancoj kiujn konis multaj Jugoslavaj gesamideanoj. Oni efektive rajtas diri ke inter la landoj subpremataj kaj torturataj de la Germanoj estas ankaù Esperantujo. Tiamaniere ĉiu numero havas tre varian enhavon. Eble ĝi estas la plej bone redaktita revuo Esperanta nuntempe. Ni esperas ke niaj Amerikaj amikoj sukcesos igi Amerikon "language-conscious" je Esperanto.

. . .

Plic ni ricevàs pli kaj pli da novaĵoj el diversaj landoj. En Anglujo oni ŝajne daŭre bonege laboradis. Oni jam rekomencas en la suda parto de Nederlando. Danujo kaj Norvegujo ankaŭ neniam tute silentis.
Ĉio tio donas multan esperon kaj multe da kuraĝo. Sed ni esperas ke oni laboras al forta kaj vera ideologia bazo. Tiam Esperanto estos ne nur amuzafero sed ankaŭ kulturfaktoro kaj idealista movado.

-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-

## G R U P A  V I V A D O.

,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,,

Raporto pri nia agado.

Dum la lasta tempo prenis la esperanta literaturo grandan lokon en niaj kunvenoj. Multaj libroj estis priparolataj kaj finfine, oni komencis legi pli multe da esperantaj libroj. Tio estas ĝojiga fakto en nia grupo, ĉar, por tute posedi lingvon ne sufiĉas nur lerni vortlistojn kaj gramatikajn regulojn, sed oni devas legi kaj paroli. Ankaŭ plibonigis en la grupo la E.-parolado de la gemembroj.
Dua ĉefpunkto de la kunvenoj estis, ke ĉiu gemembro devas priparoli(kun aliaj vortoj: devas doni lecionon) pri gramatika punkto. Tio estas certe tre utila, ĉar: estas ripeto de la lecionoj por ĉiu, kaj donas pli da certeco al la parolanto, pri veni publike pritrakti iun aferon kaj forigas ankaŭ la timemon kiun ĉiu havas, kiu la unuan fojon parolas antaŭ amaso.
Pri la amuzkunvenoj oni povas diri ke oni aŭdis belan muzikon(bedaŭrinde ankaŭ ofte jazz'on ) prizorgata de S° Gilbert Druyneel. Venis speco de muzik-maniakeco inter la gemembroj, eĉ C. Callemaert kaj J. Dezeyne komencas lerni la ludon de E°-kantoj sur la piano, kaj S° Sidi Marabout ofte kantas la belan "Kanto de la Nokto", kiun certe la geanoj tre ŝatante akceptas.
Pro la bela vetero, la ekskursoj al Ryckevelde rekomenciĝis, kaj oni tre bone amuziĝas tie.

- - - - - - -

Gesamideanoj, dum ke la homoj en nia lando batalaĉas por la paco, ni lasu batali por la paco inter la homoj !

. . . . .

Apenaŭ ni povis saluti kaj bonvenigi en nia grupo nian eminentan poniron Et. DE BAETS kiu revenis el Germanujo kaj jam li reforiras pro servo en la armeo. Same nia tre bona membro F. Vernimme ankaŭ jam okupis sian postenon en la armeo. Grava perdo por la grupa agado. Sed ni scias ke tiuj du ĝis en la medolo konvinkitaj esperantistoj disvastigos ĉie nian lingvon kaj nian ideon. Espereble ni baldaŭ vidos la aliajn el Germanujo. Ankaŭ Fons Normo nun militservas, sed estas en Brugge. Nia sekretario bedaŭrinde deĵoras malpriksime de ni.
La Esperanto kurso finis per tre bona ekzameno kaj estas nun aktivaj membroj la jenaj personoj: Agnes De Roo, Jo Lips, Gilbert Louridan, André Vander Donckt, Louis Vlaminck, Marc Bract, Willy Isselée. Baldaŭ faros la ekzamenon : Raoul Behaeghel, kaj V. Damme. Ni jam bonvenigis ilin en la laborkunvenoj. Ni komencis novan kurson. Por la provleciono kaj la enkonduka paroladeto, nur I2 personoj ĉeestis inter kiuj ok atemeostudentoj. Verŝajne ni ne faris sufiĉe da propagando kvankam la lokaj gazetoj prenis anoncon. Tamen kelkaj aliaj sin jam anoncis por la unua l ecionede kiu ankaŭ malgranda ekspozicio ilustros la pasintan paroladeton.

A. CLAEYS F. ROOSE.

---===XXXX---===XXXX---===XXXX---===

Angulo de la serĉemuloj

Ni gratulas fraŭlinojn M. T. ROOSE, Germaine MALLET kaj Sinjoro R. ISERENTANT kiuj solvis la enigmon de la numero de Marto. La unuan premion gajnas tiu lasta ĉar li havas nur unu eraron.
Sur antaŭ paĝo estas jam alia enigmo.

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

VOORAANSTAANDE PERSONALITEITEN OVER ESPERANTO.

..........................................................

Francesco NITTI, eens le Minister van Italië: " Esperanto beteekent een der grootste experimenten in de geschiedenis van de menschelijke cultuur"

Lew TOLSTOI , de groote Russische schrijver en denker ook Esperantist : "Het offer dat ieder persoon uit onze Westersche wereld zich oplegt met het leeren van Esperanto is zoodanig klein, en de gevolgen die er kunnen

. . . .

[illegible] zijn zoodanig groot, dat niemand zich van die proef mag [illegible]den".

[illegible] LEMAN, de verdediger van de Luikervesting in 1914 : "[illegible] het standpunt van de verspreiding der betrekkingen over gansch de wereld, is de uitvinding van Dr Zamenhof de groo[illegible]"

[illegible] Dr Emile BOIRAC van de Universiteit van Dyon : " Esperanto is het [illegible] van de Democratie".

[illegible] ROLLAND, Fransch letterkundige en Nobelprijswinnaar, gestorven in [illegible]ember 1944 : " Esperanto zou moeten officieel in de scholen onderwezen worden. Zonder dat zal het niet mogelijk zijn een soliede en duurzame [illegible]eenkomst tusschen de volkeren te voltrekken. Als de naties moeten aan-[illegible] sluiten, dan moeten zij eerst naar mekaar luisteren en mekaar verstaan".

[illegible] Republikeinsche Spaansche staatsman Francisco Pi y Marsal schreef reeds [illegible] 1893 in "El nuevo Regimen": "Wij, die zoo graag de muren tusschen de [illegible] neergebroken zagen, wij mogen nooit moede worden de studie van [illegible] aan te bevelen aan alle personen met geest en hert die oprecht [illegible] in de geestelijke en zedelijke vooruitgang der volkeren."

[illegible] groote aardrijkskundige met wereldfaam Elisee RECLUS constateert de [illegible] grooter en grooter wordende uitbreiding van Esperanto, in het zesde [illegible] van zijn monumentaal werk " De mensch en de aarde ".

[illegible]s SAROLEA, professor in de Fransche letterkunde aan de universiteit [illegible] Edinburgh in Schotland: "Ik ken al de argumenten waarmede men getracht [illegible] de vestiging van een internationale taal in 't algemeen en van Es-[illegible] in 't bijzonder te bekampen. Ik weet echter ook dat de argumenten [illegible] voordeel van Esperanto van grooter gewicht zijn. Ik heb Esperanto [illegible] en ben tot het besluit gekomen dat de studie van deze taal van [illegible] philosophische waarde is."

[illegible]elijk de befaamde Fransche linguist Prof. Dr Meillet: " de mogelijk-[illegible] het scheppen eener kunstmatige taal, gemakkelijk van constructie [illegible]kelijk om leeren, is in de praktijk bewezen. Alle theoretische dis-[illegible] zijn vruchteloos: Esperanto werkt".

[illegible] aanhalingen komen uit een artikel van een generaal van het Spaansch [illegible] leger, nu in Mexico, Julio Mangada, getiteld "Esperanto for a [illegible] world " en verschenen in "American Esperantist " Maart-April

[illegible] veel dergelijke citaten van autoriteiten, zonder wij kunnen [illegible] voor brengen. Hoe komt het dan dat Esperanto nog niet door alle staten [illegible] aangenomen en nog niet op het leerplan van alle scholen komt ? [illegible] de menschelijke traagheid. Velen zeggen niet neen, zeggen zelfs ja, [illegible] stellen de daad niet. Aan hen moet het Esperanto als 't ware opgedron-[illegible] worden. Het Esperanto zal zich aan hen opdringen naarmate het meer en [illegible] vorderingen maakt. Al vechtende moet het zich een plaats in de wereld [illegible]. En gaat het langzaam, zelfs heel langzaam, het is des te duurzamer.

& & & & & & & & & &

& & & & & & &

[illegible]ULOJ pensas :

[illegible] interesoj de la homaro pasas antaŭ la bonfarto de la patrujo.
(Godfried Kurth).

[illegible] mirus malbonon pri vi kaj se tiu estas vera, plibigu vin. Se tiu [illegible] malvera, ridu pri ĝi (Epiktetos)

[illegible] vundoj. Sed pardonitaj pokoj estos gloraj cikatroj kiuj ni ek-[illegible] la batalo por Kristo ( Magda Santens).

[illegible] la studado, kaj vi evitos tiamaniere ĉiujn malŝategojn de la ek-[illegible]. Ne enuo dumtaga ne igos vin deziri al la ripozo de la nokto kaj [illegible] dargo al vi mem kaj vi ne estos senutila al la aliaj.

(Seneka ).

x x x x x x x x x x x x x x x x